

Fruktoj blankaj, oblongaj, 8-10 mm longaj; pulpo maldika, trarvidebla. Semoj 2.5-3.0 mm diametre.

Vallesia maihluhuac nomiĝas honore al indonezia botanikistino Sharon Maihluhu.

Dankesprimio

Mi dankas al *Roger Lewin*, *Tony Burgess* kaj *Robert Scarborough* pro helpo kaj konsilo.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Joseph E. LAFERRIÈRE
P. O. Box 23034 (36, Parkis Ave)
Providence RI, 02903
U.S.A.

Priaŭtoro informo

D-ro *Laferrière* finis servon kadre de Aŭtonoma Universitato de la ŝtato *Morelos*, Meksikio, ĉe Herbario *CEAMISH (Centro de Educacion Ambiental e Investigaciones Sierra de Huautla)* kaj translokiĝis al *Providence*, Usono, kie li naskiĝis 1955.

Universitato Arizona en la urbo *Tucsono (Tucson)* donis 1991 al la aŭtoro la titolon "Doktoro pri Ekologio" pro liaj botanikaj studoj en Meksikio.

D-ro *Laferrière* ankaŭ laboris en Kanado, Kolombio, Indonezio kaj en Universitato Harvard, Usono. Li nun servas ĉe Fonduso Botanika de *Woonasquatucket Valley Botanical Foundation*.

Glosaro (vortoj ne en Plena Ilustrita Vortaro)

holotipo = specimeno, kiu oficiale reprezentas la specion laŭ Kodo Internacia de la Botanika Nomenklaturado

ostiolo = truo, per kiu iras insekto en la floraron de planto

Scienca Eŝo

Laŭreato 1997 pri la premio "Fantazia Scienco"

Komence de 1997 d-ro *Bernard Heuvelmans* ricevis la *Gabriele-Peters*-premion "Fantazia Scienco". La solena transdono de la distingo okazis en Zoologia Instituto kaj Muzeo de Universitato de Hamburgo, Germanujo. La distingo estis donata al plej elstaraj esplorkomandoj interligite de arto kaj scienco. La laŭreato 1997 estis *Bernard Heuvelmans*, kiu doktoriĝis en zoologio kaj nuntempe vivas en Francujo. Li estas rigardata kiel la "*Brehm* pri la nekonata bestomondo". *

La okdekjarulo dediĉis siajn dumvivajn studojn al jenaj specioj, kies ekziston la scienco forte pridubas - ĉu kiel formortinta kaj ne plu rekonstruebla specio ĉu kiel fabla estaĵo. La firma esplorkomando de *Heuvelmans* kaj lia ĝisfunda dokumentado de fontomaterialo kaj vid-atestantoj fakte kreis specialan branĉon de la zoologio, la kriptozoologion.

En la nuntempa granda forpereo de specioj estas ŝuldata al tiu fakbranĉo speciala danko pro tuta vico de surprizaj malkovroj, kiuj egalgrade pliriĉigis la arton kaj sciencan esploron. La laboron de d-ro *Heuvelmans* plej bone karakterizas la sekva anekdoto pri sepkapa hidro - tiam vere skandalo por la eruditoj en la fama 'Komerca kaj Hansa urbo' Hamburgo.

En printempo de la jaro 1735 la sveda natursciencisto Karlo Lineo (*Carolus Linné*) trapasis dek tagojn en Hamburgo. Lia famkonata ĉeflaboraĵo *Systema naturae*, la scienca bazo pri ordigo de la planto- kaj bestospecioj, tiam estis preskaŭ tute kompletigita.

La eruditoj de Hamburgo prezentis al la 28-jarulo kun orgojla fiero siajn parkojn, bibliotekojn, sciencajn kolektaĵojn. Fine ili volis fanfaroni ankaŭ pri la plej pompa luksaĵo en la urbo: la sepkapa hidro. La hamburga komercisto s-ro *Natorp* estis aĉetinta tiun sciencan sensaciaĵon dek-kvin jarojn antaŭe kontraŭ pluraj miloj da "regnaj taleroj".

La juna svedo senmetafore elbuŝigis kion li pensis pri tiu mirindaĵo - nome nenion. Sep kapoj de musteloj elstaris el korpo de grandega serpento, kelkaj kilogramoj da seĝpolvo kaj lignera defalaĵo donis al la monstro firman staturon. Laŭ Lineo tiu falsiĵo ne valoris eĉ cent talerojn. Sed s-ro *Natorp* jam estis lombardinta sian raraĵon per dek mil taleroj! Tial li volis aperigi la svedan scienciston antaŭ Hamburga tribunalo.

Lineo sekvis la konsilon de justicklerulo kaj forlasis la urbon tuj en la sama nokto.

* *Alfred Brehm* (1829 - 1884), elstara Germana zoologo, famiĝis pro sia plurvoluma kaj bele kolorita ĉeflaboraĵo "*Brehm's Tierleben*" (= Viva Bestomondo laŭ *Brehm*) kiun tiam -kaj eĉ nuntempe- konas preskaŭ ĉiu Germano, juna kaj maljuna. (sa)